

# V[a] Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

**Sant Feliu de Guíxols, 28[a]-29[a] Junio 1914[a]**



SANT FELIU DE GUÍXOLS : LA URBO

La urbo de la V[a] Kongreso de la K. E. F. estas industria apudmara urbo, el 16 mil loĝantoj, sidanta sur valo inter pentrinda montaro, kie kreskas arbaroj el pinoj kaj korkkverkoj, kiuj estas fonto de riĉeco por la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Produktoj el la kamparo estas, inter aliaj malpli gravaj, vinberoj, olivoj, kaj diversaj grenoj (tritiko, hordeo, k. c.)



SANT FELIU DE GUÍXOLS : LA HAVENO

La ellaborado kaj manufakturo de la korko konsistigas la plej gravan industrion en Sant Feliu, kaj la eksportado de l' korkaĵoj necesigis la konstruon de haveno, kiun nuntempe oni plivastigas per ŝtona ĝeto

La bela mara promenejo, — el du aleoj kiel tiu, kiun la bildo montras — estas animita kunvenejo de la urbanoj precipe dum la someraj vesperoj, kiam la agrabla temperaturo restigas ilin tie longajn horojn. Apud ĝi la Aleo *(Rambla)* Vidal estas ankaŭ loko de rendevuo




SANT FELIU DE GUÍXOLS : PROMENEJO APUD LA MARO




Sant Feliu de Guíxols : Aleo Pi i Margall

La konstruaĵo de la nova kazino «La Constancia», kiu entenas libroriĉan bibliotekon, staras flanke de la Aleo Pí i Margall, kiun ĝi plibeligas. Ankaŭ la kazino «El Guixolense», kie sidas la Komerca Ĉambro, estas moderna rimarkinda konstruaĵo apud la Mara Promenejo

Sant Pol estas kvartalo en la ĉirkaŭaĵo de Sant Feliu, kie somerdomoj kaj vilaoj arte konstruitaj proponas al trasomerantoj plej agrablan restadejon




Sant Feliu de Guíxols : Sant Pol



Sant Feliu de Guíxols : La marbordo

La latinvelaj barkoj, kiuj kuŝas sur la bordo en la apuda bildo, naĝas ĉiutage sur la lazura ebenaĵo por provizi de fiŝviando la urbon kaj ĝian regionon. Rava spektaklo estas, vidi ilin kiel aron de flugantaj mevoj super la varie blua maro, sur kiun oreflama suno dispecetigas siajn radiojn en mil ŝanĝantajn nuancojn!

*Pedra alta*, la alta ŝtono, kiu majeste balanĉigas sur la pinto de roko, estas vizitinda natura monumento en la ĉirkaŭaĵo de Sant Feliu. Laŭ ŝajne prava opinio, ĝi ne estas menhiro — tia oni konsideris ĝin antaŭtempe — sed rezultaĵo el senĉesa rodado de akvoj sur la tero, ĝin iam kovrinta en pratempaj epokoj



Sant Feliu de Guíxols
Pedra Alta